



MALGRANDA

N:RO 3 **REVUO** 1947

5-a JARO

PREZO: 1.- Kr.

ENHAVO:

| | Paĝo |
|--|------|
| PRI MR | 1 |
| ENKONDUKO AL BELETRO de L. C. Deij | 3 |
| KIEL LA KANARIAJ INSULOJ ENIRIS LA HISTORION de Juan Régulo Pérez | 14 |
| DEBATO | 19 |
| POEMOJ | 22 |
| LITERATURO | 25 |
| PENSU MEMI..... | 29 |
| LA NORDATLANTA METEOROLOGIA SERVO de Gido R. Emfeld | 31 |

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 4 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23.

Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo", Neutorgasse 9, Wien I.
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brusel W.
Britujo: Libroservo de IEL, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).
Danujo: Dro P. Th. Justesen, Fannerup pr Kolind.
Finlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä.
Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.
Italujo: Sro Leo Costantini, Banco di Roma, filiale, Milano.
Nederlando: Libroservo FLE, Roelantstr. 4, Amsterdam W.
Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.
Portugalujo: Sro Saldanha Carreira, Av. Grão Vasco, 33, r/c, Benfca-Lisboa.
Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.
Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.

MALGRANDA REVUO

Nro 3

5-a JARO

1947

Pri MR

En nro 1/47 de MR mi skribis iom pri la ekonomia stato de la revuo. Poste multaj samideanoj el diversaj landoj skribis al mi pri MR. Ilia intereso por la entrepreno estas granda kaj serioza. Kelkaj propagandis per artikoloj en diversaj gazetoj. Mi kore dankas vin ĉiujn.

Kiam mi skribis, ke "ĉstus sence eldoni revuon por ne ekzistantaj legantoj", mi kompreneble pensis pri la nombro da abonantoj kaj legantoj, kiu mankas sed estas necesa por ke la eldonado estu finance ebla kaj rilate al la klopodoj sencohava. Kompreneble mi ne pensis pri la fidela rondo de legantoj kaj kunlaborantoj, kiu vere ekzistas. Pardonu min, se tiuj vortoj faris impreson, kiun mi ne celis.

Iu samideano konsilis, ke mi eldonu RM monate. Ĉar ĝi aperas nur kvaronjare, multaj ne rimarkas ĝin aŭ forĝas ĝin. Estas vero en tiu aserto. Mi volonte eldonus la revuon pli ofte, sed mi ne povas kovri perdon por pli ol kvar numeroj jare. Krom tio ŝajnas ne eble akiri kontentige da altkvalitaj artikoloj, variaj kaj de diversaj aŭtoroj, por ke ili sufiĉu por monata eldono. Se MR atingos mil abonantojn estos eble eldoni ĝin pli ofte aŭ pligrandigi ĝin.

Iu demandis, se oni ne — se mankas originalaj artikoloj — povas aperigi tradukojn de nacilingvaj artikoloj. Certe. Mi ja mem tradukis kelkajn tiajn artikolojn el la sveda. Sed ili nepre estu tre altkvalitaj kaj havu pli malpli ĝeneralan intereson. Proponantoj de tiaj artikoloj havigu apcrigrajton. Honorario estas laŭ postulo pagata al la rajtoposedanto. Tiaj artikoloj estas eĉ dezirindaj. Flanke de sia propra valoro ili en malgran-

daj sed gravaj rondoj humanistaj kaj sciencistaj pli bone pledas por esperanto ol faras tutaj ĉaroj da propagandaj folioj. Tamen limigo kompreneble estas necesa. Antaŭ ĉio ni devas mem kulturi nian propran kampon.

Oni rekomendis reklamon. Por reklamo oni bezonas monon. Cetere reklamo ne multe utilus. Revuo kun tiom serioza kaj pensopostula enhavo ne fariĝas ŝatata legaĵo de vasta publiko. La plej valoraj nacilingvaj revuoj ofte havas nemulte da legantoj kaj ofte povas ekzisti nur dank' al oferema laboro kaj subteno. MR tamen certe povos havi pli da abonantoj, eĉ kontentige multaj por ebligi senperdan eldonadon de revuo diversrilate pli bona ol la ĝismuna. Plej efika propagando por tia revuo estas la persona. Se vi rekomendos kaj konigos MR al viaj amikoj proksimaj kaj malproksimaj, ni per tio certe atingos pli bonan rezulton ol per multe da anoncoj.

Malnovaj numeroj troviĝas abunde, grandparte haveblaj por malalta prezo. Forigo de tiu stoko estus valora helpo. Oni povas donace sendi iun aŭ iujn ekz. al amikoj, kiuj ne konas la revuon, oni povas uzi ilin por legado kaj diskutado en daŭrigaj kursoj kaj studrondoj.

Ĉirkaŭ MR kolektiĝis amika rondo, kiu bone komprenas la celon kaj sencon de la revuo. Kelkajn el ili mi konas almenaŭ letere, aliajn tute ne. Sed ĉiuj ni estas pli malpli ligitaj unu al la aliaj. La celo de MR ne estas formala, ekstera sukceso de gazeta entrepreno. MR estas rimedo por celado de tute alia speco. En la ombro de tria mondmilito povas ŝajni sensece klopodi por domo kaj kulturo. Tamen tiaj klopodoj estas la solaj sennehavaj. En rezigno estas neniam da senco. Tial ni daŭrigu.

S. K.

En 1943 (komenca jaro) aperis de MR nur 2 nroj, same en 1945, en la ceteraj jaroj 4 nroj. Elĉerpitaj estas la nroj 2/43, 1/44, 1/45, 1/46. La nroj de 1943-44 estas vendataj por po 0,55 kr. inkl. afrankon.

Enkonduko al Beletro De L. C. DEIJ

1.

Belarto prezentas impresojn, pensojn, sentojn kaj ideojn en bela kaj originala formo, t. e. en formo, kiu plaĉas al vido, aŭdo kaj spirito (= bela), en formo nova, kontrasta al kopio (= origin-ala). Artistoj prezentas tamen ne nur belon. Ankaŭ la utilo ludas gravan rolon: belaspektaj domoj servas por restado kaj laboro (konstruanto); bonstilaj mebloj donas komforton kaj ripozon (skulptarto); la lingvo estas ideo kaj pensa komunikilo. Sed eĉ havante pure praktikan celon oni povas krei belajn. Tio dependas de la estetika formpovo.

Jam la primitiva homo penis ornamo ekz. meblojn krude hakitajn el falinta arbotrunko. El tio evoluis la vidaj belartoj. Pli poste en la kulturhistorio ofte mankas rekta rilato inter belo kaj utilo. Per "utilo" mi komprenas tamen ne nur praktikan uzeblon de konkretaj aĵoj sed ankaŭ cdukvaloron, pensinstigon, kulturapogon, moralinstruon ktp.

2.

Artistoj (belistoj, estetikistoj) uzas diversajn materialojn: marmoron kaj bronzon por skulpti, farbon kaj tolon por pentri, harmoniajn sonojn por komponi, feron kaj betonon por konstrui. *La materialo de la beletristo estas la lingvo.*

"Nu, kio estas literaturo? Krei belon per lingvo!"

(E. Privat)

Diversaj materialoj kondukas al diversaj esprimrimedoj. Pentristo parolas al ni per linioj kaj koloroj, muzikisto per melodioj kaj ritmo. La rimedoj de la beletristo estas: senco kaj sono de la vortoj, aranĝo kaj melodio de la frazoj, stilo kaj kompono (forma kaj ideo), ritmo kaj idiomo.

Multaj fakaj terminoj rilatas al du aŭ pluraj artoj. Tio ne estas tute hazarda, kvankam la lingvo ofte etendas vortan signifon de unu objekto al alia. Efektive ĉiuj artoj estas humilaj servantoj de unu sola diino: Belo. Ni rimarkas, ke ankaŭ la nefaka lingvouzo ĉarme montras, ke diversaj artoj tamen estas iel najbaraj. Oni parolas ja pri "poezia pentraĵo" kaj

"kolora poezio", pri "poemo el ŝtono" (bela monumento), "monumenta poemo" ktp.

3.

Poeto estas 1) verkanto de poemoj, 2) krcanto de stila kaj idea belo. Propre do ĉiuj artistoj estas poetoj: pentristoj, skulptistoj, muzikistoj. Kaj pli: ĉiu homo estas poeto, kiam por momento lin kaptas kaj kortuŝas io bela.

"Oni renkontas multajn, kiuj estas poetoj kaj mem tion ne scias."

(Cervantes)

La diferenco inter artpoeto kaj "ordinara" homo estas tute ne pli profunda sentopovo ĉe la unua sed poezia formpovo, kapablo arte esprimi tion, kion aliaj nur sentas kaj pensas. Ekzistas nur grada diferenco, ne cscenca. Ofte poeto havas pli da spirita viglo, pli da fantazio. Liaj pensoj tuj kombinas impresojn kun ideoj kaj sentoj. La okuloj tuj kaptas detalojn. Plej grava estas tamen la aparta, spirita kapablo esprimi sentojn kaj pensojn en bela, origina formo. Tia kapablo estas denaska talento, kiun oni ne povas lerni, nur stimuli.

"La naturo naskas la poeton, la belarto lin edukas."

(Vondel)

Ankaŭ inter poetoj kaj aliaj artistoj ne ekzistas cscenca diferenco. Talenton ĉiu havas, kvankam ne laŭ sama grado.

4.

Talento kaj nur talento povas el homo fari poeton. Literatura ambicio, kulturamo kaj lingva lerto foje kondukas al eĉ admirinda formpovo, al kiu tamen senteble mankas natura kreimpulso.

"Nascantur poetae, fiunt oratores."

(Naskiĝas poetoj, fariĝas oratoroj)

Vera poeto naskiĝas, kvankam ankaŭ aliaj faktoroj ludas rolon: tradicio, reago, modo, tempomedio. Krome artistoj kaj artaĵoj influas unu la alian.

Tradicio estas natura forto (de homo kaj popolo), kiu kreas tipajn kutimojn kaj opiniojn kun ideo valoro. Kontraste al la morta konvencio ĝi estas plene vivanta, spirita komunposedaĵo. Nia tradicio iom post iom evoluas el nia esperanta vivo, el tio, kio nin kunligas krom la lingvo mem: organizoj, gazetaro, kongresoj, interna ideo, homaranismo, sennaciismo.

"La vivo de popolo' animas ĝian arton."

(Rodembach)

Nia tradicio estas ankoraŭ juna kaj ne tre influa sur la literatura kampo. La kaŭzo estas evidenta.

"Niaj komunposedaĵoj ne estas pretaj sed konstruataj, konstruotaj".

(Engholm)

Originala verkado stimulas tradicihavan kulturon. Tradicia kulturo stimulas originalan verkadon.

Reago estas plej ofte impulso, kiu akcelas kreadon de belartaĵoj, kiuj estas forme aŭ spirite — aŭ ambaŭmaniere — malaj al tiuj, kiujn oni malŝatas. Ĝi povas kontraŭi al kulturo degeneranta (konstrua reago) kaj al kulturo progresanta (konservativa reago). Ne malofte ambaŭ potencaj reafikoj kaŭzas moviĝon de altiraj kaj forpuŝaj fortoj, kies dinamiko fine malhelpas kaj troevoluo kaj stagnon. (Fundamentismo kontraŭ lingva ekspansio).

Modo povas influi temelekton (Jean Forge) kaj eksteran formon.

Tempomedio (abstrakta tuto de sociaj, politikaj kaj ekonomiaj fortoj en certa tempo) same influas la temojn (tendencromanoj) sed ankaŭ la pensmanieron kaj esprimmanieron de ĉiu homo, artisto aŭ ne.

Resume: 1) Vera belartaĵo nepre havas individuan kaj originalan karakteron. 2) Ĝi havas certajn aspektojn kaj elementojn, kiuj troviĝas ankaŭ en aliaj verkoj el la sama tempo (kulturperiodo). 3) Malsamaj artoj (almenaŭ el sama periodo) estas iel parencaj kiel prozo kaj poezio. 4) Tipajn aspektojn de la tradicio ni retrovas en ĉiuj artoj.

La esperanta beleto ne tiom evoluis, ke ĝi povas eĉ iom influi aliajn artojn. En la lingvo kaj la movado tamen latentas taŭga bazo por almenaŭ du novaĵoj (propraj) kulturasppektoj: teatro kaj muziko (kantarto). La esperantomuziko devus esti konforma al la propra sono kaj aparta (ina) ritmo de nia lingvo.

La vidaj belartoj kaj la muziko jam delonge rompis la naciajn kadrojn, evoluante al ia kultura universalismo. La evoluo de nia lingvo devus esti laŭa, por ke ni jam nun havu apogon de ampleksa kulturo, kiam ni mem ne povas krei.

"Ĉu vere ekzistas pure homaj sentoj same komunaj al la anoj de diversaj nacioj, tion povos studi kaj ilustradi la estonta esperanta literaturo."

(E. Privat)

5.

En ĉiu homo vivas deziro al belo. Tial popolo kiom ajn primitiva tamen iaforme kreas arton. La kulturo de popolo speguliĝas en ĝia arto. Tiu artkreado estas ne io distra kaj amuza sed nepre necesa kaj por la kreado kaj por la kulturo.

"Barbaro estas kiu ajn
la voĉon poczian ne aŭdante."

(Goethe)

"Kiel estus eble, ke lingvo vivus sen literaturo? Al vivanta lingvo ĝi estas ja necesa kvazaŭ la koro al vivanta homo."

(E. Privat)

Vera artisto devas esprimi la emociojn, kiuj regas lin, sen tio li sufokiĝus.

"Malforta nun mi kantas plorotakte
— virino povra — mian plendon kaj suferon,
ke ne sufoku min doloro ne kantita."

(H. Roland-Holst)

Kvankam ni klopodas malkaŝi la sekretojn de la arto, ni neniam plensukcesos en tio. Artverko estas nun vivanta organismo, kies ĉiuj detaloj estas ne malhaveblaj croj de la tulo, ĉiuj same gravaj: la senco kaj la sono de la vortoj, la bildoj,

kiujn ili elvokas, la ritmo, la kompono, la stilo. Poezio restas io miriga, oni povus diri mirakla, ne kaptobla per nura racio. Poemo, kiun ni ne plene komprenas, tamen impresas nin, tuŝas nin interne. Precipe la muzika poemarto naskas nedireblajn sentojn. Oni povas ja distingi muzikan poemarton, kies muzikaj lingvoelementoj superas la aliajn, kaj sencan poemarton, en kiu vortsignifo kaj lingvobildoj estas plej elstaraj. Muzika poemo estas lingva komplekso de harmoniaj sonoj, en kiu sintakso, metriko kaj signifo estas akcesoraj. Senca poemo estas *idekomplekso*, kies detalojn oni povus ritme, strofe, logike kaj sintakse determini. Oni povus — ĉar bona poemo estas tiel konstruita, ke pro la tuto oni povas forgesi la kunmetojn de la partoj (Engholm). En la muzika poemarto la signifo de la vortoj estas ne klara, ne preciza. Tiaj poemoj estas precipe sentelvokaj, kiel la muziko mem. Muzikemaj poetoj parolas la lingvon de la komponistoj kvankam ne tiel elokvente. Male en la senca poemarto la signifo de la vortoj estas ofte eĉ pli klara, pli rekte trafa ol en la prozo. Plej ofte poemoj estas nek pure muzikaj nek plene sencohavaj, kaj propre neniu verkaĵo estas nur arto.

La destino de esperanto (lingvo internacia!) postulas sencohavan arton, kies muzikaj kaj pure artaj elementoj, kvankam nepre gravaj, estas akompanaj, ne gvidaj.

6.

Poezio estas pura, kiam ĝi havas ĉiujn ecojn proprajn al la specifa karaktero de bona poemo. La poczia specifo estas nek la lingvo kaj la stilo, nek la ritmo kaj la sono, nek eĉ la esprimitaj pensoj kaj sentoj mem. Ĝi estas la intenseco de tiuj pensoj kaj sentoj, la interna vivodona streĉiĝo kune kun la plena harmonio inter formo kaj enhavo. Pura poezio estas malŝarĝo de batanta koro; ĝi estas ankaŭ la plej konkreta manifestiĝo de lingva belo. Per ĝi la lingvo esprimas tiom, kiom ĝi povas: la propran spiriton, la propran sonoron, la propran ritmon. El tio sekvas, ke pura poezio estas netradukebla.

Lingva belo estas tamen ne tute natura sed parte fiksita de tradicioj kaj kutimoj. Tio rezultas el la fakto, ke "la sonoj ne (plu) havas naturan sed laŭplaĉan signifon" (Rabelais).

Inverse oni esprimas certajn signifojn per laŭplaĉaj sonoj. Tiel eĉ la primitivaj onomatopeoj estas ne naturaj sed lingvo konvenciaj sonimitoj. Ekzemple la kokokrion oni "imitas" france per cocorico, angle per cock-a-doodle-do, germane per kikeriki, kaj ĉiuj rigardas sian onomatopeon tute realofidela.

"... al ĉio oni povas alkitimiĝi, kaj kio hieraŭ ŝajnis al ni sovaĝa, tio morgaŭ aperas kiel io tute natura kaj bela; per longa kaj multspeca uzado eĉ la plej sovaĝo idiomo de la plej barbara gento iom post iom fariĝis riĉa, eleganta kaj oportuna lingvo."

(Zamenhof)

Kio en unu lingvo sonas agrable, tio en alia lingvo povas soni malagrabla. Tial la lingvaj belo kaj ĉarmo de esperanto povos plene maturiĝi nur per propra, originala verkaro.

7.

Poetoj verkas ne kun ekzaltita kapo. Rilata al romanverkisto tio estas ja tute ne ebla, ĉar la amplekso de la verkaĵo flamiĝas lin dum multaj monatoj, iam eĉ dum jaroj. Sed ankaŭ verkisto de malgrandaĵoj kreas ne senbride kun blinda ekstazo (krom — eble — en la tempo de la Romantiko). Plej ofte la kreo-impulso tamen ekzaltas la poeton nur en tia grado, ke li tamen regas sian plumon kaj ne pekas kontraŭ la "metio". Ĉar kiom la versfarado koncernas teknikon (metriko, rimoj, kompono, lingvoreguloj) ĝi estas kvazaŭ metio, kiun oni dum certa tempo devas praktiki por kolekti faksperon kaj rutinon. Ni aldonu tamen, ke troa rutino estas danĝera al la vera poezio.

Farinte poemon la verkisto ofte korektas ĝin. En la 17a kaj la 18a jarcentoj oni faris tion intence.

"Sur stablon dudekfoje remetu la verkaĵon,
poluru ĝin konstante kaj ree ĝin poluru."

(Boileau, 17a jarcento.)

Tiel polurante oni oferis la naturan belon sur la altaro de la teknika perfekteco. Tio estas nepre malbona. Tamen poeto povas konvinkiĝi pri tio, ke alia vorto estus pli trafa, ke iu

frazo estas sintakse neglata kaj postulas modifon, ke rimoj kaj ritmo povus esti pli adekvataj.

"Venki la teknikon estas la sola celo de la tekniko."

(Adama van Schellema)

Kontraste al multaj prozverkistoj (al kiuj polurado estas rekomendinda) la poetoj ofte korektas tuj frazon post frazo, vorton post vorto, antaŭ ol la poemo estas preta. Cetere verkado estas persona afero.

"Ne estas al mi malfacile trovi pensojn al miaj rimoj."

(J. Perk)

"Mi ofte prenis la plumon ne sciante... kio verkiĝos!
Mi sentis nur ian deziron al sonoj, al vortodanco,"

(A. Verwey)

"Kiam oni verkas, tiam kompreneble gravas la senco, la ideoj esprimitaj. La formon oni devas prilaboradi poste."

(Lanti)

Poemojn oni ne studas. Ili kaptas nin tuj kaj senpere. Tamen ĉiu leganto devus koni almenaŭ la elementajn regulojn de versfarado, kompreni la fakajn terminojn, iom scii ankaŭ pri la historio.

"La amo al ĉiu objekto estas infano de la kompreno. La amo estas des pli arda, ju pli klara estas la kompreno."

(Leonardo da Vinci)

La regulojn ni povas instrui, pri la belo de poemoj ni povas nur paroli.

"Oni ne povas pruvi, ke io estas bela. Ĉu oni povas pruvi, ke vangofrapo doloras?"

(F. van Eden)

Pruvi la propran poezian belon de esperanto ŝajnas eĉ pli malfacile. Multaj el niaj poetoj penas nur imiti la naciajn lingvojn. Sed tio ja pasos. La unua aŭtomobilo havis la ortangulan formon de eksmoda fiakro. Pasis jaroj, antaŭ ol oni komprenis, ke estas tute ne necese, eĉ ne dezirinde, ke aŭto simulu fiakron.

Post la romantiko la eŭropa literaturo estas precipe realisma. Esperanto, havinte sian propran romantikon (la komuna poemaro esperantisma), evoluas en sama direkto. Nuntempaj aŭtoroj havas plezuron kaj ŝaton en prezentado de konkretaj aferoj.

Naturalismo aŭ *realismo* estas profunda interesiĝo pri la eksteraj aspektoj de la vivo (naturo kaj socio), proksimume tia intereso, kian havas ankaŭ la fizikistoj, do materia, korpa kaj ekstera kontraste al spirita, morala kaj interna — kontraste ankaŭ al nereala fantazio. "Natura artis magistra" — naturo estas instruisto al arto. Realisto adoras la naturon, kies ĉiuj detaloj estas por li same gravaj partoj de la ĉiam vidologa kaj atentokapta vivo. Li zorgas apenaŭ pri niaj deosentoj, pri postuloj de moralo kaj konvencio. Li apenaŭ konas la diferencon inter belo kaj malbelo — ĉio estas vivo, parto de la mirinda kaj grandioza naturo, kaj ĉion li volas prezenti ekzakte, realofidele, sen ornamo kaj sen fantazio. (Propre naturalismo originas en forta reago kontraŭ la tro fantaziera romantiko.) Tamen la fotografia ekzakto, per kiu la unuaj naturalistoj (precipe francoj) kopiis nur la eksterajn formojn, diras ne multe pri la senco de la vivo. Kaj kiel la fizikistoj aspiras trovi ian klarigan teoremon, ian naturleĝon, kiu per unu fojo lumigas la rezulton de mil faritaj observoj kaj eksperimentoj, same la plej bonaj naturalistoj (Zola, Maupassant) klopodis sintezi la abundajn detalojn en unu moralkernan vivkoncepton. Reproduktante la eksterajn ilin vidigas al ni ankaŭ la kaŝitan internon de la vivo. Esperanta naturalisto estas ekz. Baghy. Lia moralkerno estas la homaranismo.

La romantiko konis nur individuajn sentojn. La naturalismo alportis individuajn pensojn. Ĝi estas la komuna skolo de la modernepoka mi-homo, t. e. individuo konscia pri la propra memo. Tio havis du gravajn efikojn por la literaturo ĝenerale, gravajn ankaŭ por nia literaturo.

La mi-sento kondukas al memfido, sekve al pli da kuraĝo, pli vigla kreoforto, malpli da inerto. La mi-homo kredas sin

nepre grava, kvazaŭ li estus la centro de la universo (francaj aŭtoroj).

La mi-konscio apartigas kaj kvazaŭ fremdigas la mi-homon de aliaj individuoj (norvegaj aŭtoroj). Tio kondukas al sol-ecosento, al pesimismo, malespero kaj hommalamo (Baudelaire). La mi-homo sentas sin malgrava, kvazaŭ polvo en la senlima kosmo.

El tio sekvas, ke la naturalismo havas aspektojn tute malsamajn depende de tio, kiel efikis la individuigo de la homa pensaro post la romantika periodo.

Krome oni ja povas:

1. Simple montri la realon, por ke la homoj vidu kaj ekkonu ĝin.
2. Pentri kaj kolori la realon, por ke la homoj ĝin admiru kaj amu.
3. Male oni povas reliefigi la malbonajn kaj malnoblajn flankojn de la vivo, por ke la homoj indigniĝu (kaj protestu).
4. Oni povas funde esplori la realon, por ke la homoj ĝin pripensu.

La realismo sub 1. estas ne la plej malbona. Simplajn, realofidelajn rakontojn oni facile memortenas, sekve oni pensas pri ili longe post la legado. La realismon sub 2. kaj 3. ni nomu "realoplastiko" pro la reliefa kaj plastika prezento de la realo. La realismon sub 4. ni nomu "ideoplastiko", ĉar ĝi reliefigas ideojn kaj pensojn. Realoplastiko havas plej ofte stilon impresionisman, ideoplastiko — ekspresionisman.

Ne ĉiuj aŭtoroj priskribas la tutan realon. Iuj atentigas precipe la amuzan flankon de la vivo (humora realismo). La stilo estas adekvata: serioza kaj detala priskribo de ridigaj kostumoj, karakterizaj gestoj, kvazaŭaŭtomataj movoj kaj afekta parolo — serioza sentimentaleco, kvazaŭkompata lakoneco, moko, ironio. La humoristoj facile troigas, serĉante ne la realon sed la afekton. Iliaj verkoj estas sub forta influo de la modo.

Aliaj prezentas al ni la periferion de la vivo, ofte kun ekzakta detalpriskribo (krudismo). El estetika vidpunkto iliaj verkoj iam ŝajnas ne aprobindaj, el lingva vidpunkto ili naskas admiron — kvankam estas erare kredi, ke ses adjektivoj estas pli imagokreaĵoj ol unu (A. Donker). Troa detalpriskribo ofte tedas kaj forturnas la atenton de esencaj aferoj.

Triaĵoj prezentas nur realofragmentojn, anekdotojn: personan sperton, ordinaran ĉiutagaĵon, gazet- aŭ radiokomunikon, eĉ ian objekton (lingva "senviva naturaĵo"). En tiaj "kernodetaloj" kaŝiĝas plej ofte personaj kaj sociaj konfliktoj aŭ problemoj. La propran animsuferon oni esprimas per malfeliĉoj de aliaj aŭ eĉ per prezento de objektoj. En pluraj lingvoj tiaj poemoj estas simplaj kion la temo mem. Oni jam parolis pri "poezio en konversacia lingvo". Efektive neniu vorto estas "pli" poezia, kvankam poetoj ofte sentas neceson de pli riĉa vortprovizo.

11

Impresionismo (impresismo) estas pentroarta termino. Impresismaj pentristoj volas redoni naturajn, lokatmosferajn, socirilatajn kaj similtajn impresojn kvazaŭ nur per lumo kaj koloro. La bildo mem (desegno, figuro) ludas apenaŭ ian rolon. La impresismaj poetoj kaj prozistoj volas vortigi tiajn impresojn per sonoj kaj lingvomuziko. La vortsignifo estas kvazaŭ akcesora, duaranga. Kaj realistoj kaj impresistoj kreas siajn bildojn el la sensimpresoj, la unuaj objekte, la aliaj subjektive. Impresisto pentras la realon ne tia, kia ĝi estas, sed kia li ĝin sentas. Pro tio li kreas arton nepre individuan. Li volas esprimi tiajn sentojn, por kiuj la homa genio ankoraŭ ne trovis vortojn, volas diri la nedireblan. Konstante li poluras kaj stilon kaj lingvon, en kiu svarmas neologismoj (sub neologismo ni komprenas ankaŭ nekutiman kunmeton de cetero komunuzaj elementoj). Gravan rolon ludas la "sinestezo", t. e. spiritimpreso ricevita per kuniĝo de sensimpresoj (ekz. koloroj farante impreson muzikan). Apartan valoron havas adjektivoj kaj epiteloj.

Ekspresionismo (esprimismo) bildigas siajn sensimpresojn kvazaŭ revelacion de la spirita vivo. La realon eksteran ĝi observas nur por elkonigi la realon internan, nematerian. La impresisto redonas la impresojn rievitajn el la realo. La esprimismo esprimas ideojn elvokitajn de la realo. Resume: naturalismo estas objekte realokopia, impresismo estas subjektive realoplastika, esprimismo estas ideoplastika. Realokopio estas informa, realoplastiko — sentelvoka, ideoplastiko — pensinstiga. Proksimume tiel la tri ismoj diferencas unu de alia, sed ili ne estas malamikoj kaj iam bone harmonias. En kelkaj verkoj ni trovas ilin kune.

Esprimismo estas tamen ne nur lingvo sed pli vore spirita reformo. Ĝi estas povo liberigi sin el kultura materialismo. Moderna poeto malfidas la materion, la ŝajnon. Li ne kopias nur la eksteron de la vivo sed radiofotos ĝian plejinternon por trovi la eble kaŝitan oron. Esprimismo estas malpli detala ol naturalismo kaj impresismo kaj ankaŭ malpli individua, oni povus diri pli sociala, pli komuneca. Restas grava la poezia formo, la lingva belo, sed nur kiel bela manifestiĝo de nepre valoraj pensoj kaj nepre puraj sentoj. La devizon "arto pro arto" oni malaprobas, kaj iom post iom la poezio fariĝas lingva konkretiĝo de la homa penso- kaj idcomondo. Do ne nur belo, ne nur estetiko kaj certe ne nur fantazio. De nun la arto mem havas respondosenton. La plej grava demando ne plu estas, kiel iu verkas, sed *kion* li verkas.

Esprimismo malpli analizas, malpli detalumas. Ĝi pli multe konstruas kaj sintezas, uzante nur tion, kio estas necesa, evitante ĉion superfluan kaj balastan. Tiel la stilo malpezigas, kaj fine eĉ la plej simplaj vortoj povas tuŝi la animon, povas esti eĉ pli impresaj kaj imagokreaĵoj ol vortoj pli pretendaj. En esprimismo la simpla, rekte trafa vorto ŝajnas pli grava ol la vortkomplekso, la frazo. Ofte ĝi mem estas frazo. Iu diris, ke esprimismo estas kvazaŭ balbutado de metaforoj. Tio estas miskompreno. Kiel ni jam diris, naturalismo kopias la realon, impresismo diras, kiel impresas la realo, esprimismo ligas la realon kun la spirito, farante ian harmonion inter konkretaj

sensimpresoj kaj abstraktaj ideoj. Ekstero kaj interno fariĝas io unuoca. Tiel la vortoj signantaj konkretajn agojn kaj aferojn povas esti uzataj kaj komprenataj, kvazaŭ ili signus agojn kaj aferojn nepereceptoblajn per la sensoj.

Impresisman lingvouzon ni trovas ĉe Baghy, idcoplastikon ĉe Engholm, kies lingva purismo tamen ne toleras tro modernan esprisman stilon. La grandan valoron de liaj verkoj oni ĝis nun ne rekonis.

Kiel la Kanariaj Insuloj eniris la historion

De JUAN RÉGULO PÉREZ

Alia art. pri Kanariaj Insuloj de la sama aŭtoro aperis en MR nro 2/46.

En la nuna stato de la studoj, kiuj celas klarigi la problemon de la kanaria prahistorio, oni povas aserti, ke la insuloj estis loĝataj jam en la tempo de la eŭropa ŝtonepoko. La tiutempaj loĝantoj estis homoj etnologie parencaj al tiuj de la Cro-Magnona raso. De tiu epoko kulturaj elementoj de mezmara deveno atingis la insulojn. La nuna geologio neas la malnovan hipotezon, laŭ kiu la insuloj iam estis unuigitaj kun Afriko. La unuaj loĝantoj necese devis alveni de trans la maro, kvankam ili poste forĝis navigacion kaj restis sen komuniko kun la kontinento. Poste la insuloj ricevis semidajn enmigrintojn kaj kun ili iliajn kulturojn, kiuj radikigis sur ĉiuj insuloj, escepte de Tenerife.

La rasmikso estis ĝenerala. El ĝi estiĝis popolo paŝtista kun tre rudimenta agrikulturo — sur la okcidentaj insuloj grotloĝantoj, sur la orientaj homoj kun malgrandaj vilaĝoj el domoj konstruitaj per ŝtonoj, sen mortero.

La mezepokaj eŭropanoj trovis tie vivanta altan ŝtonepokan kulturon. La regada (politika) organizo estis de tipo genta aŭ triba, simila al malgrandaj monarkioj. El vortoj kaj frazoj

postlasitaj al ni de samepokaj kronikistoj la kompara lingvoscienco konkludas, ke la lingvo, kvankam dialekte aparta sur ĉiu insulo, estis parenca al la nunaj lingvoj kaj dialektoj berberaj. Nuntempe arkeologoj kaj etnologoj fervore laboras pri antikvaj restaĵoj, loĝejoj, objektoj kaj malnovaj literaturaj mencioj por lumigi la pasinton de la insularo — pasinton, kiu tuŝas la kulturhistorion ankaŭ de praaj eŭropaj kaj nordafrikaj rasoj.

La renesancaj humanistoj kaj multaj postaj sciencaj esplorantoj supozis — kelkaj eĉ nuntempe supozas — ke la Elizeaj kampoj, la Gardeno de la hesperidoj kaj Atlantiso estis mitoj forĝitaj per sciigoj, kiujn la klasikaj popoloj kaj aŭtoroj ricevis el la insuloj aŭ pri ili. Kaj ili penis akordigi tiujn notojn de la klasika literaturo kun la geografiaj cirkonstancoj, kiujn fakte havas la insuloj. Sed tio estis vana peno. La Feliĉaj insuloj de la klasikaj aŭtoroj neniam estis reale la nunaj Kanariaj Insuloj. Tiu nomo de la insularo vere estas nur posta retorika figuro.

La klasikuloj tamen ne malkonis la insularon. Plutarkos citas konkrete en sia biografio pri Sertorius kelkajn insulojn, kiuj tre verŝajne estas la orientaj Kanariaj insuloj. Eble vizitis ilin ankaŭ la marveturanta kartagano kun Hannon. La geografo Statius Sebosus konis ilian ekziston, kaj Plinius postlasis al ni resumon — kvankam konfuzan — pri la vizito al la insularo farita laŭ ordono de la maŭritania reĝo Iuba. Ankaŭ la aleksandriaj geografoj mencias ilin, kaj Ptolemeos fiksas la unuan meridianon ĉe la plej okcidenta el la insuloj, hodiaŭ nomata El Hierro.

La marvetura tekniko, kiu dum jarcentoj malrapide perfektigis en Meza maro, atingis gravajn rezultojn jam en la Xila jarcento. Krom la kompas venis la ŝipdirektilo. Tiu anstataŭas la flankan remilon por direkti la ŝipon, permesas pliigi la tunkvanton kaj la grandon de mastoj kaj veloj kaj ebligas direkti la ŝipon kun sekureco ĝis tiam nekonata. La naviganto konas siajn vojojn. Li povas reiri sur ili, kiam li volas. Jam ne plu ripetiĝas la okazo, ke maristo, kiu atingas nekonatajn bordojn, ne scias reiri al la elirpunkto. La kompas ebligas al la maristo veturi malproksime de la bordoj. Tio ne estis ebla por malnovtempaj direktistoj. Ili ne povis determini, kie sur la maro ili

estas, se ili ne havis antaŭ la okuloj iun punkton por esti rilaton.

La maristoj de Meza maro baldaŭ proprigis al si kaj uzis tiun novan teknikon marveturan. Ili desegnis la unuajn mezepokajn markartojn kun la atlantaj bordoj kaj havenoj. Sur tiuj kartoj troviĝas la Kanariaj insuloj, kvankam ne ĉiam samnombro. Ili estis insuloj foje vidataj, foje forgesitaj dum la lastaj mezepokaj jarcentoj. Sed la ĝenovano Lancelotto Malocelle komence de la XIVa jarcento sukcesis atingi tiun insulon, kiu laŭ li hodiaŭ nomiĝas Lanzarote. Karton de tiu insulo desegnis en 1339 unufoje la kataluna geografo-desegnisto Angelino Dulcert. Sur la insulo li desegnis ankaŭ la blazonajn insignojn de la Ĝenova respubliko, kiuj fariĝis stereotipa ŝablono por preskaŭ ĉiuj mezepokaj kartoj de tiu ĉi mondparto. La karto de Dulcert havas ankaŭ aliajn insulojn, inter ili la misteran Sanktan Brandanon (Insula Sancti Brandani), eĥan enkorpiĝon de nordĉropa legendo ĉerpita el la mezepoka ravmita geografio.

Portugalujo komencas fari riĉajn akirojn dank' al la nova tekniko. Ĝenovanoj kaj florencanoj komencas servi al Portugalujo. Kelkaj el ili atingas ĉe admiralan rangon de tiu lando. La unuan konatan rakonton pri vizito al Kanariaj Insuloj faris 1341 la florencano Nicoloso da Recco en leteroj, kiujn li el Sevilla sendis al sia patrujo. Ankoraŭ en la XIVa jarcento katalunoj kaj majorkanoj (el Mallorca), edukitaj en la misia spirito propra al la patrujo de Raymond Lull, ripetas la vojaĝon al Kanariaj Insuloj. Post ili venas portugaloj kaj hispanoj el la atlantaj havenoj, ekzemple la biskajano Martín Ruiz de Avendaño kaj Gonzalo Pérez Martel el Sevilla, veraj piratoj kies sola celo estis havigi al si indiĝenojn kiel sklavojn.

En la jaro 1344 la papo Klemento VI donis la suverenecon super la insuloj kun la titolo Princo de Fortuno al Don Luis de Hispanujo, pranco de la hispana reĝo Alfonso X. Tiam regis en Kastilujo Alfonso XI kaj en Aragono Pedro IV, ĉe kiuj la princo petis helpon por sia konkera ekspedicio. La princo ne sukcesis ĝin efektiviĝi; sed kun tiu peno rilatiĝas la vojaĝoj de katalunoj kaj majorkanoj tra la XIVa jarcento.

Je la komenco de XVa jarcento du normandaj kavliroj, Jean de Béthencourt kaj Gadifer de la Salle, komencas la aventuran

konkron de la insuloj. Tiu vojaĝo ŝajnas ĉapitro el kavalira romano, viva enkorpiĝo de la mezepoka kavalira spirito. — Ili eliras el la franca haveno La Rochelle kaj konkreas la insulojn Lanzarote, Fuerteventura kaj El Hierro. La hispana reĝo Enrique III rekonis la rajton de tiuj unuaj konkerantoj kaj metis ilin feŭde sub sian protekton. En tia stato komenciĝas la rivalco pri la insuloj. La papa kortego havas intereson pri misiaj agoj. Portugaloj sub la reĝo Don Henriko la Naviganto ofte faris ekspediciojn al la insuloj, ĉefe al La Gomera. Nevo de la konkrinto Béthencourt vendas la jam konkeritajn insulojn al hispana andaluzia nobelo, grafo de Niebla. Post pluraj intertraktoj pri la insuloj suriras la hispanan tronon la Katolikaj Gereĝoj¹⁾ Don Fernando kaj Doña Isabel. En tiu epoko plifortiĝis la reĝa potenco en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj. Tiu politiko atingas ankaŭ la Kanariajn insulojn, kaj la hispanaj gereĝoj submetas la feŭdajn nobelojn de la malpli gravaj insuloj kaj prenas por si la du ĉefajn insulojn, Gran Canaria kaj Tenerife. Tio okazis ĉirkaŭ 1477.

La Katolikaj Gereĝoj Fernando kaj Isabel intencis fari el la insuloj hispanan provincon. Por tio ili daŭrigis la konkron per paciaj procedoj, farante pakkontraktojn kun la indiĝenoj. Sed paralele ili uzis ankaŭ militajn rimedojn por subigi kontraŭstarantojn, kiuj rifuĝis en montarojn kaj sovaĝajn lokojn de la insuloj. La konkro de Gran Canaria okazis per rekta kaj komuna fero de la Rubikona Episkopo (Episcopus Rubicensis — titolo de la unuaj episkopoj de la unua episkopejo de la insularo, sur la insulo Lanzarote) kaj la gereĝoj. La konkro de Tenerife kaj La Palma inaŭguras sistemon de privata iniciato sub oficiala protekto — sistemo poste tre uzata dum la konkro de Ameriko.

La konkro de Gran Canaria komenciĝis en 1483. Trupoj sub komando de episkopa oficiro kaj sub fakta gvido de gereĝaj profesiaj militistoj kontraktis kaj luktis kun la indiĝenoj ĝis 1495. Kiam tiu afero estis preta, la episkopo kaj la civila estraro de la novkonkerta insulo planis militakiri La Palman. Por la konkro de tiu insulo multe helpis indiĝena sklavino el La Palma mem, Franciska la Palmanino, kiu sukcesis kristanigi kvin insulajn tribestrojn. Dank' al tio la konkro de La Palma

fariĝis sekura. Alonso Fernández de Lugo entreprenis al militon de Tenerife. Kiel sur la aliaj insuloj ankaŭ tie ĉi parto de la indiĝenoj estis amika al la konkerantoj kaj same estis parto kontraŭstara. Fernández de Lugo suferis kelkajn tre gravajn malvenkojn. Sed por tre primitiva popolo, kiu en tiu insulo ne konis eĉ agrikulturon, ne estis obla sukcesa kontraŭstaro. En la somero 1496 Fernández de Lugo proklamis plenan subigon de Tenerife.

Tiu ago finis la konkeron de la Kanaria insularo, kaj per ĝi la insularo eniris la historion. La mistere allogaj Feliĉaj Insuloj jam ĉesis esti geografia ĥimero. Kun la krepusko de la mezepoko krepuskiĝas ankaŭ ĝiaj ravimagoj kaj fabeloj; kun la finiĝo de mezepoko mortas ankaŭ la mita tradicio heredita de la klasikuloj. *Hai tón makáron névoi* de la grekoj, *arva beata* de la latinoj, *la beatulaj aŭ feliĉaj insuloj* de la postaj literaturoj fariĝas retorika figuro. La humanistaj klopodoj por revivigi tiujn insulojn kaj trovi ilian lokon en la Kanaria insularo estis vana.

Sed ne ĉio finiĝis. Ankaŭ la historia epoko trempigis multajn plumojn, novaj famoj leviĝis. Tiuj famoj tamen havis firman bazon en la realo. En la historia epoko famigas la insulojn farbolikenoj, vegetaĵaj gumoj, vinoj, koĉnilo ktp. En niaj tagoj la nomo de la insularo kuniĝas kun insularaj tomatoj, bananoj, milda klimato. Sed pri tio mi skribos alian fojon.

Kanariaj Insuloj en junio 1947.

J. Régulo Pérez.

1) Mi skribas katolikaj Gereĝoj, ĉar per la edziĝo de Fernando, reĝo de Aragono, kaj Isabel, reĝino de Kastilio, estis kreata la hispana nacia unuiĝo. Post la edziĝo ĉiu restis reĝo en sia propra lando, kvankam fakte ambaŭ egale kunregis ambaŭ regolandojn. La vorto "katolikaj" estas titolo donita de la papo al tiuj gereĝoj. Per tiu titolo oni ĉiam citas ilin en hispanaj libroj pri historio kaj literaturo.

Debato

Ĉis nun — komenco de aŭgusto — venis neniu komento pri la artikolo "La fundamento de la vivo" en nro 2/47 de MR. Verŝajne estas kontraŭ kutimo, ke redaktoro komentas artikolon, kiun la legantoj ne emas komenti. La artikolo tamen ŝajnas al mi tiel gravtema, tiel interesa kaj valora, ke mi deziras fari kelkajn rimarkigojn pri ĝi.

En la parto pri la rezonleĝo estas dirite: "Ĉiu t. n. sankta skribo, kiu enhavas kontraŭdirojn, pro tio enhavas same multe da neveroj kaj per tio refutas sin mem kaj montriĝas stulta, nefidinda homa laboraĵo. Ĉiuj religiaj doktrinoj, kiuj enhavas kontraŭojn (la triumfo ktp.) estas kontraŭveraj teologiaj elpensaĵoj, kiujn la buŝo povas konfesi sed la logika penso ne akcepti."

La libroj de la diversaj religioj enhavas kontraŭdirojn kaj absurdaĵojn rilate al la fizikaj leĝoj, la rezonleĝoj kaj eĉ al la moralsento. Tio estas objektiva konstato. Diri kaŭze de tio, ke ili enhavas same multe da neveroj, ke ili montriĝas stulta, nefidinda homa laboraĵo kaj kontraŭveraj teologiaj elpensaĵoj, tio estas persona valorprijugo, kiu krome malatentas komprenon por evoluo kaj historio.

La religiaj libroj enhavas konceptojn, sopirojn kaj spiritaĵajn klopodojn de certaj homoj en certaj medioj kaj certaj tempoj. Prijugi ilin sole rilate al nuntempa fizika sciigo, logika rezonado kaj postuloj de absoluta moralsento estus sensece. Platon montras kelkloke tre naivajn natursciencajn konceptojn. Ĉu pro tio ni diras, ke liaj dialogoj enhavas same multe da neveroj, ke ili montriĝas stulta, nefidinda homa laboraĵo, kontraŭveraj filozofiaj elpensaĵoj? Kaj same rilate al sciencistoj antikvaj kaj mezepokaj. Multaj el iliaj klarigoj kaj asertoj estas eraraj. Tamen ni ne diras, ke ili mensogis. Ili faris tiom, kiom ili kapablis, kaj tio en ilia tempo signifis evoluon, progreson. Same ni devas konsideri la religiajn librojn.

Neniel estas mirige, ke tiuj libroj enhavas multe da neperfektaĵoj. Sed estas mirinde, ke en ili troviĝas tiom da profunda

pensado pri la vivo, universala vivocelado, ke apud ili la nuntempa spirita vivo ŝajnas pigmea.

Religio okupas sin parte pri io, kion ni ne povas koncepti, sekve ankaŭ ne esprimi. Tial la religia esprimado grandparte estas simbola. Por homo, kiu prijuĝas poezion sole laŭ formala logiko, en matematika maniero, poemoj estas stultaĵoj, krimoj kontraŭ racia esprimado. Por homo, kiu en la sama maniero prijuĝas religion, la religia esprimado ŝajnas absurda.

En la artikolo estas dirite: "Ne kia konduto sed kia inklino (emo, motivo) estas nobla aŭ malnobla, jen por kio validas la sola eterna morallego..." La sama maniero por prijuĝo estas aplikinda al religia esprimado. La esenca afero troviĝas ne en la formala logikeco sed en la inklino.

La artikolo parolas pri inklinmorale (propra moralsento) kaj ordonmorale (moralkodo ordonata al la homoj). La lastan ĝi kondamnas kiel falsan. Ĉu kontraŭeco entute ekzistas? Estas evidente, ke la moralaj ordonoj, ekz. la dek ordonoj de Moseo, venas el la moralsento de la homoj. De kie ili aliofaze povas veni? Ĉiuj homoj ne havas egale evoluantan moralsenton. Tial la plej moralsentaj homoj esprimis la moralsenton en formo de moralaj postuloj (ordonoj), por ke la plej alta moralkoncepto de la tempo fariĝu kiel eble plej ĝenerala kaj efika. Estas duhinde, ĉu morala socia kunvivo estus ebla sen tia vorta esprimo de la moralsento. — Kio estas la ĉefa afero en la dek ordonoj, la popolaj legendoj pri la castigo de la ordonoj aŭ la ordonoj mem kiel esprimo de la homa moralsento? Ĉu la legendoj pri ilia estiĝo nuligas ilian valoron kiel esprimo de la moralsento? — Alia afero estas, kiam homoj faras arbitrajn ordonojn. Bona klarigo pri inklinmorale kaj ordonmorale troviĝas en la vortoj de Jesuo. Li diris, ke li venis ne por detrui la leĝon sed por plenumi ĝin, t. e. perfektigi, transformi ĝin en ion pli altan. Li provis anstataŭigi la ĝeneralan ordonkoncepton per morallega koncepto, sed tio ne detruis la valoron kaj la validon en la moralpostulo de la ordonoj. Aliloke li parolas pri homoj, kiuj pro siaj arbitraj ordonoj nuligas la ordonojn de Dio (la moralsenton).

*

Homo nesperta en pensado kaj rezonado povus de "La fundamento de la vivo" ricevi la impreson, ke ĝi prezentas novan

instruon, noveltrovon, kiu kondukos al perfekta vivo kaj feliĉo, se la homoj nur aprobus tiujn pensojn kaj forigos ĉion religian. Ĉe multaj tio pli efikas al la sentoj ol al la racio. Tiel ĉe doktrino pri racio facile fariĝas kredo, speco de religio.

Sistemigo ofte enhavas iom da danĝero, precipe kiam temas pri determino de vero. La tri leĝoj fundamentaj por la vivo fakte iom similas al nova speco de triumuo. Ĉu ili estas egalaj, aŭ ĉu iu superas la aliajn? Ĉu ili estas interdependaj, ĉu iu el ili entenas jam en si iun el la aliaj? La naturleĝo ne havas esceptojn. En certa cirkonstanco ĉio aŭtomate reagas en certa maniero. La rezonleĝo estas jam pli komplikita afero. Certe ni pensas laŭ certa donita maniero kaj ne povas alie pensi. Sed pensado estas ne nur korekta kunmeto de frazpartoj. En la praktika pensado la premisoj kaj la prijuĝo pri la premisoj estas tre variaj, kaj malgraŭ korekta pensado ni venas al tre diversaj konkludoj. Tial nia pensado kaj rezonado estas multe pli konfuza ol povas supozigi la simpla pensoleĝo.

Same rilate al la morallego. La moralsento ekzistas, sed ĝi ne efikas aŭtomate kiel la naturleĝo. Ni devas mem elekti, voli, klopodi. Kaj kiu estas kapabla solvi la problemojn, kiuj estiĝas, se ni agas kontraŭ la moralsento?

*

Ĉu eltrovo de la vero kaj justa agado (agado laŭ la moralsento) povas esti rigardataj kiel vivosenco, vivocelo? Se jes, kio estas la diferenco de tia rigardmaniero kaj religio? Religio estas klopodo al komuneco kaj unueco kun la plej esenca en la tuta universa vivo, vi nomu tion Dio, principo, leĝo, aŭ vi uzu ĉe nenium nomon por ĝi. Al tio klopodas la homoj laŭ diversaj nomoj kaj diversaj konceptoj.

Kaj se vi diras, ke la rezonleĝo kaj la morallego ne signifas vivocelon kaj vivsencon, ke ili estas nur formoj de la vivado same kiel la naturleĝo, kie tiufaze restas celo kaj senco? Ĉu ne bezonataj? Certe homoj povas vivi sen sento pri celo kaj senco, sed multege da homoj havis kaj havas tian senton aŭ sopiron, kaj sen ĝi kaj kontentigo al ĝi la vivo estus al ili ne vivinda. Tio estas fakto, same multe kiel la moralsento.

Per la supraj vortoj mi volas nek fari kredantajn kristanojn el liberpensuloj nek liberpensulojn el kredantaj kristanoj aŭ el anoj de aliaj religiformoj. Ĉiu sentu, pensu kaj vivu sian spiritan vivon laŭ sia propra naturo. Tio estas la sola vojo de evoluo. Se ni ĉe kontraŭaj partioj trovas ion komunan, ni zorge gardu tion. Komuneco, eĉ se malgranda, estas la sola grundo, sur kiu ni povas komenci konstrui la komunan hejmon de la homaro.

Esence kaj grandtrajte mi lute konsentas kun la enhavo de "La fundamento de la vivo". Naturego, pensoleĝo kaj moralego estas aŭ devas esti bazaj faktoj por pensado kaj agado. Miaj vortoj estas nur sugestoj — kaj eĉ kiel sugestoj tre limigitaj — pri la ampleksa kaj pripensinda temo.

S. E.

Terpomoj

De L. C. DEIJ

Paĉjo! Al la kampo kun terpomoj
kuru, kuru ni kun la ĉareto!
Hejme restis krom tri, kvar legomoj
nur malplenaj poloj sur la breto.
Panjo — kiel gaje ŝi kapjesis,
kiam la terpomojn ni promosis,
grandajn, rondajn en plenplenaj sako!
Kaj ni ridis — malgraŭ la stomakoj.

Paĉjo! Ĉu la kampo kun terpomoj
estas malproksime de ĉi tie?
Jam de longe ne vidiĝas domoj,
kaj se noktos — ĉu ni dormos ic
sur la frosta vojo? Kaj se venos
la germanoj, paĉjo, kaj vin prenos?
Ĉu mi sola tiun kampon trovos?
Tion, paĉjo, tion mi ne povos.

Paĉjo! Ĉu la kampo kun terpomoj...
ĉu la kampo vere tiom plenos?
Iras tiel multaj, multaj homoj,
kaj ni eble tro malfrue venos.
Kaj se tamen iom ni deportus,
ĉu la — ĉu ne panjo — eble mortus
jam? Ĉar ni foriris en sabato,
mardo nun — ŝi mortos de malsato...

*

Filo! De la kampo kun terpomoj
kuru, kuru ni kun la ĉareto!
Hejme restis krom tri kvar legomoj
nur malplenaj potoj sur la breto.
Panjo — ĉe la pordo mi ŝin vidas!
Ĉu mi ne povas vi ne tu!
Pezajn, plenajn sakojn ni alportis —
saltu, filo, de la ĉaro! — Sed li mortis.

La foto

De L. C. DEIJ

Min demandas via foto:
Kiam vi revenos kara?
La konvalo floris kaj la miozoto,
brulis jam la kaŝtanujo kandellume,
spiris la siringoj tiel dolĉeparfume —
kaj vi ne revenis kara...

Kaj mi ridas al la foto:
Tamen mi revenos kara!
— Ne forgesu! — diras via miozoto,
— la kandeloj brulas jam por nia festo,
la siringoj estos por la nuptovesto. —
Baldaŭ mi revenos kara!

Min demandas via foto:
Kiam vi revenos kara?
La ĝarden' odoras je malseka koto,
sur la nudaj branĉoj kuras frostotremoj,
ĵus formortis niaj lastaj krizantemoj,
kaj vi ne revenis, kara. . . .

Kaj mi ploras al la foto:
Se mi ne revenos, kara. . . .
— Ne forgesu! — diros via miozoto,
— iam la kandeloj brulos tiel lumc,
iam la siringoj spiros dolĉparfume. . . .
Vi min ne forgesos, kara.

La liberulo

De EINO LEINO

Liberan viron igi sklavo
ne estas eble per perforto,
kateno, sabro en kohorto,
nek per la truda vorto;
se ĉio falas sub ciklono,
li staras kvazaŭ pinkolono,
kaj se li falas, per fatalo
la faliganton trafas falo.

Li vere estas liberulo,
li, kies vojo kaj kalkulo,
dum vagas idear pendole,
memstara restas sole.
Perfort ne estas al li skuo,
nek jugo la popola bruo.
Por li soleca, nokto vojo,
senastra eĉ — nur ĝojo.

Libera viro al la Morto
eldiras per trankvila vorto:
"Mi mortos ja, sed ne laboro,
la cel de mia vivohoro."
Ĉu morto plej terura dono?
Ne, de hero ĝi estas krono,
kiam postulas konscienco
kaj justa homtendenco.

Trad. Vilho Setälä.

Literaturo

Shakespeare: Antonio kaj Kleopatro. Proza trad. de Stephen A. Andrew. Eld. The Esperanto Publishing Co. Prezo: Broŝ. 2 ŝ. 6 p., afr. 2 p., aŭ 11 rpk afrankite.

Prosa traduko de versa originalo povas havi du celojn: unue precizan redonon de la enhavo, due popularigon de la verko. La traduko de Antonio kaj Kleopatra certe estas senriproĉa rilate al la unua punkto. Rilate al la dua ĝi povus en kelkaj lokoj havi pli simplan stilon. Uzo de la finaĵo -o por virinaj nomoj, kiam oni povas uzi -a, ŝajnas ne rekomendinda.

Jen kelkaj ekzemploj pri iom peza stilo, kiun oni povas pli-simpligi.

Esp: Vi pretervivis la sinjorinon nun servatan de vi. — Angl: You shall outlive the lady whom you serve. — Al mi ŝajnas pli simpla kaj preferinda: . . . kiun vi servas.

Esp: . . . ankaŭ la leteroj ricevitaj de multaj por ni klopodantaj amikoj en Romo petegas al ni hejmeniri. — Angl: . . . but the letters too of many our contriving friends in Rome petition us at home. — Ĉu ne pli simple: . . . ankaŭ la leteroj de multaj klopodantaj amikoj en Romo petas nin iri hejmen. (Ev: . . . multaj amikoj, kiuj klopodas por ni en Romo, . . .)

Esp: Kion mi do faru ne jam faritan de mi? — Angl: What should I do, I do not? — Kial ne: Kion mi do faru, kion mi ne faras?

Esp: Ke lia honto lin rapidirigu en Romon! — Angl: Let his shame quickly drive him to Rome! — Mi preferus: Lia honto rapide pelu lin al Romo!

La vortoj foje estas pezaĵ. Troviĝas multe da afliksoj ne necesaj. Anstataŭ malsategiĝo (famine) suliĉus malsatego aŭ eĉ malsato, anstataŭ feliĉeco feliĉo, anstataŭ forgesemeco forgeso ktp.

Adultulinedzo kaj adultulinedzigi estas korekte faritaj vortoj kaj korekte redonas la ideon de la originaj vortoj. Tamen ili pli similas al kodo ol al viva, sentoredona lingvo.

Eraroj pri verba modo: Ho, ke neniam mi vidis ŝin! — Mi volus, ke neniam ŝi donis al vi permeson.

Pezaĵ, multvortaj frazoj povas esti tolereblaj kaj eĉ ĝueblaj kiam bone deklamataj en la origina versa formo. Sed nek por teatra prezento nek por silenta lego bone konvenas frazo de tiu ĉi tipo:

"Se li pasigus sian libertempon per volupta agado, tiam supersataĉo kaj forsekiĝinta medolo estus lia rekompenco; sed malŝpari tian valoran tempon kia trumpetvoĉe lin petegas forlasi sian diboĉadon, kaj samlaŭte lin atentigas pri lia bonstato kaj la nia — tiu ja meritis admonon tian, kian oni donus al junulo jam socimatura, se li oferus siajn spertojn por hodiaŭaj vantaĵoj, tiamaniere ribelante kontraŭ sia plej bona juĝo."

Per la supraj ekzemploj, hazarde elektitaj sur kelkaj paĝoj, mi volas atentigi pri ĝenerale dezirinda simpleco de traduka lingvo, dezirinda precipe kiam la celo estas popularigi legaĵon, kiu al diversaj homoj eble ŝajnas malfacila. Tio ne signifas malrekomendon al la libro. Multaj, kiuj ne scias la anglan kaj al kiuj nacia versa traduko ŝajnas peza kaj eĉ seninteresa, povas per tiu ĉi traduko bone kaj funde konatiĝi kun la enhavo de Antonio kaj Kleopatra.

Premiaj romanetoj. Eld. The Esperanto Publishing Co.
Prezo: Broŝ. 2 ŝ. 6 p., afr. 2 p., aŭ 11 rpk afrankite.

La libro ampleksas 95 paĝojn kaj enhavas 23 mallongajn rakontojn, kiujn diversaj personoj verkis por konkurso. La

antaŭparolo ne informas, ĉu la konkurso okazis por literatura celo aŭ nur por instigi esperantistojn al skribado. Literaturan valoron la rakontoj ne havas. Ili tamen estas verkitaĵoj kun certa rakontotekniko, sen tro multe da vortoj, kaj la lingvo estas simpla kaj ĝenerale bona. Tial la libro ŝajnas bone taŭga por daŭrigaj kursoj.

Agostinho da Silva: Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo.
Trad. J. J. Rodrigues. — Agostinho da Silva: Vivo kaj arto de Goya. Trad. Vergilio Mendes. Eld. Portugala Eldona Rondo. Monte da Lapa, 49 - 1, Porto.

Tiuj du libretoj estas la unuaj en nova serio de ses volumetoj, kiujn aperigas Portugala Eldona Rondo. Kiel la pli frue aperintaj volumetoj de la sama aŭtoro ankaŭ tiuj ĉi havas la amplekson kaj la prezentmanieron de populara prelego. Ili estas tre rekomendindaj al ĉiuj, kiuj ne konas tiujn temojn. La frazkonstruo estas foje iomete peza, tamen ne ĝene, kaj escepte kelkajn eraretojn la lingvo estas korekta.

La libretoj estas haveblaj de la eldonejo por po 2 rpk aŭ 10 rpk por 6 volumetoj. En preskaŭ ĉiuj landoj oni povas mendi ilin de landaj perantoj, por prezo responde al la dirita. La venontaj libretoj estas: Historio de Usono, La antaŭhistoria arto, La Budhismo, Vivo de Nansen.

Hans Thirring: La mondopaco kiel psikologia problemo. Antaŭparolo al la psikologio de la kulturaj degenerfenomenoj. El la germana trad. Hugo Sirk. Eldonis Esperanto-Eldonejo "Tramondo", Vieno.

Jen aŭstria scienca kontribuo al la klopodoj por paco. En la antaŭparolo la aŭtoro informas, ke la verketo (36paĝa) estas resumo de pli ampleksa libro baldaŭ aperonta: Homo Sapiens, fundamentoj de psikologio de la kulturaj degenerfenomenoj.

La aŭtoro analizas psikajn kaŭzojn de militoj kaj rekomendas rimedojn kontraŭ militemo. Li certe estas multe tro optimisma, kiam li asertas, ke konvena popollerneca kaj mezlerneca instru-

ado povas krei ĉe la homoj tian pensmanieron, ke ili ne plu volos militi. Tiu lia aserto tamen ne signifas, ke la ceteraj vidpunktoj kaj ideoj estas ignorindaj. Almenaŭ la pli multaj estas evidente veraj kaj tre atentindaj. Mi ne sukcesis eltrovi, ĉu la aŭtoro pretendas aŭ ne, ke tiuj ideoj kaj vidpunktoj estas lia persona eltrovo kaj verko. Cetero lia vidpunkto tiurilate ne gravas. Sufiĉas por la legantoj tio, ke la libro estas verkita sincere, bone kaj por treege grava celo.

En la esperantista vivo ofte mankas — almenaŭ ŝajnas manki — konvenaj eblecoj por praktika kultura laboro. Jen bona okazo: Fondu studrondon, studu kaj diskutu tiun libron! Tio estus esperanta kulturlaboro ne sensignifa.

La stilo estas sufiĉe germana rilate al frazamplekso kaj vortabundo en la frazoj, sed certe tio dependas ne de la tradukinto, kies laboro evidente estas bona. Mi opinias, ke ĉenreakcio estus pli bona vorto ol katenreakcio, transfiguriĝo pli bona ol transfiguro.

La libro verŝajne estas havebla ĉe la diverslandaj libroservoj. Mi ne havas precizindikon, sed ĉe la libroservo de IEL la prezo estas 1 ŝ. + afr. 1 p., aŭ 4 rpk.

La societo de amikoj (kvakeroj). George Fox (fondinto de la religia societo de amikoj). Eld. Friends Service Council, London.

Tiuj du broŝuroj temas pri la kvakera movado kaj ĝia fondinto. Ili estas bonaj kaj legindaj. Tiuj kaj La evangelio laŭ Sankta Marko, La evangelio laŭ Sankta Johano, Biblio-partoj (bildfolioj kun bibliaj tekstoj) estas senpage riceveblaj (skribu preslitere) kontraŭ rpk por aŭfranko de: Internacia Kristana Frataro, 21 Mitchell Road, Palmers Green, London, N. 13.

Henry Thomas Hamblin: Povo sukcesi. Trad. kaj eld.: F. W. Hipsley, 17, Abbots Road, Birmingham, 14, Anglujo. Prezo inkl. afr. 1 ŝ. aŭ 4 rpk.

Tre bonstile tradukita verketo pri atingo de sukceso materia kaj spirita kaj pri la senco de sukceso.

Pensu mem!

Teruraj estis la bildoj el la milito, teruraj la bildoj el germanaj koncentrejoj, teruraj la postmilitaj bildoj de ruinoj, malsato, mizero kaj homa sovaĝiĝo. Sed pli teruraj ol ĉiuj aliaj ŝajnis kaj ŝajnas al mi tiuj antaŭmilitaj bildoj, kiuj prezentas amasegon da homoj aŭskultantaj oratorojn de sia gvidanto aŭ hurlantaj al li sian estimon kaj adoron. Tiuj homoj propravole forĵetis la plej gravajn kaj valorajn kvalitojn de vera homo: propran pensadon kaj propran prijuĝon, memstarecon en konduto kaj agado. Kaj same animpreson impreson faris bildoj de sportistoj, militistoj kaj eĉ junuloj kaj infanoj perfekte dresitaj laŭ la deziro kaj al la honoro de tiu gvidanto.

Se tiuj kaj multaj aliaj homoj estus havintaj iom da sento por propra homa valoro, por propra pensokapablo kaj memstareco, la granda katastrofo estus ne okazinta. Tia aserto estas superflua. Kaj tamen — denove prezentas sin la sama pretenco forĵeti la plej gravajn kvalitojn de veraj homoj por anstataŭe fariĝi robotoj movataj de fremda volo. Vi diras, ke vi nun ne vidis tiajn bildojn, ne rimarkis tiajn tendencojn? Certe la tendenco ordinare ne estas tiel evidenta kiel en la tempo de Hitler kaj Mussolini. Tamen ĝi ekzistas, ĉar kvankam pli malpli forta ĝi ĉiam kaj ĉie ekzistas.

Se vi estas socialdemokrato, vi certe povas trovi iujn punktojn en la programo kaj la agado de la konservativuloj, kiuj laŭ plene objektiva rigardo estas falsaj kaj nebonaj. Komprenble. Tamen tiuj aĉaj konservativuloj persiste asertas ke ili estas pravaj en tiuj punktoj. Konscie aŭ nekoscie ili mensogas. Ili pensas kaj prijuĝas ne objektivite sed laŭ sia partia programo, laŭ sia persona kaj partia avantaĝo.

Se vi estas konservativulo, vi certe povas trovi similajn mankojn ĉe la socialdemokratoj.

Kaj jen demando al vi ambaŭ: Ĉu vi estas konvinkita aŭ firme kredas, ke via partio estas tute prava en ĉio, aŭ ĉu ĝi povas foje erari kaj la kontraŭuloj pravi? Ĉu sufiĉas por via pensado kaj prijuĝo tio, kion diras via partia gazeto, aŭ ĉu vi esploras kaj prijuĝas aferojn laŭ faktaj cirkonstancoj kaj

ĉiurilate kiel oble plej racie? Kaj ĉe vi trovas, ke via partio kaj ĝiaj gazetoj malpravas kaj maljuste agas — ĉu vi tiam povas konfesi tion kaj atentigi pri tio al tiuj, kiuj ne komprenas la eraron?

Certe kaj konservativulo kaj socialdemokrato kaj ano de kiu ajn partio emfazas asertas, ke ĝuste en lia partio ĉiuj homoj pensas kaj prijuĝas objektivite, kaj se oni farus eraron, oni ankaŭ konfesus tion.

Ekzistas certe en ĉiuj partioj homoj, kiuj pensas aŭ sincere provas pensi kaj prijuĝi aferojn objektivite. Sed tre multaj ne faras tion. Ili sekvas la plej facilan vojon. Estas penige pensi mem, kaj la rezulto de objektiva pensado ne ĉiam estas agrabla kaj avantaĝa al oni mem. Estas pli facile entuziasmiĝi por tio, kio ŝajnas niaparte agrabla kaj avantaĝa, fidele subteni tion kaj konsideri tion korekta, kion diras la gvidantoj de la propra partio.

Se partio troviĝas en tia stato, ke ekzistas nur unu komuna pensmaniero kaj prijuĝo pri ĉiuj gravaj aferoj, se gazetoj kaj partianoj ĉiam ripetas la vortojn de la gvidantoj, se la vidpunktoj de la kontraŭuloj ĉiam estas konsiderataj falsaj kaj aĉaj — tiam estas danĝero. Tiam amaso da homoj memvole forĵetis prudenton kaj rezonkapablon kaj fariĝis senanimaj instrumentoj de iu aŭ inuj gvidantoj. Tiel okazis en Germanujo kaj Italujo. Tiel povas okazi en kiu ajn lando, en kiu ajn partio, egale ĉu dekstra ĉu maldekstra.

Precipe danĝeraj estas tiaj tendencoj, kiam la socio troviĝas en psike kaj ekonomie ne ekvilibra stato kaj kiam temas pri partioj kun ekstremaj celoj.

La ekzemplo pri la socialdemokrato kaj la konservativulo povas servi por illustri la rilaton inter propra objektiva pensado kaj senkritika doktrinservo en ĉiuj sociaj kampoj, kaj ĝi validas ankaŭ por multaj partoj de la spirita vivo.

Por povi rezoni kaj prijuĝi objektivite, estas necese preni la materialon por la pensado ne el idologiaj aŭ kredodoktrinaj pensofabrikoj sed el la ĉirkaŭa, reala vivo, el la faktaj cirkonstancoj, kaj poste uzi tiun materialon kiel oble plej bone laŭ la penskapablo, kiam ni havas.

Por multaj aferoj oni bezonas multe da scio. Se ni ne havas la necesan scion, ni ne pretendu, ke ni povas senerare juĝi pri ili. Sed cetero simpla senprijuga pensokapablo sufiĉas por multaj kaj eĉ komplikitaj aferoj. Homo, kiu malmulte legas sed rekte observas la vivon kaj uzas sian propran pensokapablon, ofte pensas kaj prijuĝas pli bone ol multinstruitaj homoj, kiuj pensas kaj prijuĝas nur ŝablone.

S. E.

La Nordatlanta Meteorologia Servo

De GIDO R. EMFELD

La vetero ankoraŭ ĉiam estas pli potenca ol la homoj. Precipe en la mar- kaj aertrafiko oni devas ĉiutage atenti la staton de la momenta kaj baldaŭ estonta vetero. Tial la meteorologoj en siaj observejoj esploras la veterajn fenomenojn, notas forton kaj direkton de la ventoj, temperaturon, aerpremon, nubostaton ktp. Tion ili plurfoje ĉiutage komunikas per radio kaj telegrafo al navigistoj kaj aliaj, por kiuj la komunikoj estas gravaj.

Por ke meteorologo povu informi navigistojn pri la venonta vetero, li bezonas observojn el granda surfaco de la tero. Tial oni kovris la kontinentojn per reto da veterstacioj, sed la oceanoj restis kiel grandaj ĝenaj dezertoj en la veterobservo. Dum la milito oni fine postenigis en Norda Atlanto kelkajn ŝipojn, kies tasko i. a. estis observi kaj konigi la veteron.

En konferenco en Dublin en marto 1946 Provizora Internacia Civila Aviada Organizo (PICAO) proponis daŭrigi tiun servon. Dum du sekvaj kongresoj en Montreal kaj Londono oni pri-traktis pluajn detalojn kaj dividis la kunlaborajn partojn de ĉiuj partoprenantaj landoj, kaj nun la nordatlanta meteorologia servo realiĝas.

En tiu oceana servo deĵoras 13 ŝipoj; 7 ŝipoj estas prizorgataj de Usono, 2 de Anglujo, 1 de Francujo, 1 de Kanado kaj Usono, 1 de Belgujo kaj Nederlando kaj 1 de Anglujo, Svedujo

kaj Norvegujo. Danujo kaj Portugalujo, kiuj jam havas taŭgajn veterstaciojn en siaj atlantaj insularoj, ne bezonas kunlabori. Ĉiu servoŝipo havas sian apartan lokon, kaj ili estas dislokitaj sur la surfaco de Norda Atlanto.

Estas proksimume 40 personoj sur ĉiu ŝipo, inter ili radiotelegrafistoj kaj meteorologoj. Ĉiu ŝipo havas modernajn aparatojn kaj elsendas veterkomunikon en ĉiu tria horo.

Aviadisto nun veturanta super la oceano disponas sufiĉe taŭgajn informojn pri la stato de la vetero en la veturdirekto. Tial li ne bezonas grandan rezervan provizon da benzino, kiel antaŭe estis necese pro eventuala nebulo renkontota aŭ pro glaciĝo sur la aloj. La malpliĝo de la rezerva provizo ebligas kunporton de pli granda varŝarĝo kaj pli multe da pasaĝeroj. Kaŭze de tio la profito de la aertrafikaj kompanioj estos iom pli granda. En Usono oni taksis, ke la veturkostoj malaltiĝos eĉ per 10 %, tio malgraŭ la alta kosto de ĉiu servoŝipo, kiu postulas proksimume milionon da dolaroj ĉiujare.

Vi komprenas, ke malpliĝis ankaŭ la risko de danĝeroj. Se tamen okazus akcidento, la reto de ŝipoj ebligus pli rapidan helpon, ĉar en la ŝipoj estas ankaŭ diversaj saviloj.

Ne nur la atlanta aertrafiko profitas de tiu nova servo. Ankaŭ la surteraj meteorologiaj stacioj povos pli kontentige funkcii. Ili ricevos pli da veterinformoj el la oceanaj regionoj kaj tial povos mem doni pli fidindajn antaŭdirojn pri la veturo en siaj ĉirkaŭaj regionoj.

Korekto

Pro skribleraro estiĝis eraro en nro 2/47, p. 13, lin. 6: anst. profitisto devas esti profesiisto.